


## 2

## BETULO

*Betula*
 2017

La bela blanka ŝelo de la betulo, kun siaj papermaldikaj tavoloj, igas la arbon facile rekonebla. Printempe ĝi estas plena je malgrandaj inaj floroj kaj gracie pendantaj viraj, kvazaŭ-vostetoj. Ĝiaj maldikaj branĉoj estas tre flekseblaj kaj tial tre taŭgaj por fariĝi vipetoj. Pro tio finnoj uzas ĝin ekzemple en saŭnoj: oni vipas sin per betula vergo trempita en akvon por ŝviti pli bone. Ankaŭ Piet, la helpanto de la Nederlanda Sinterklaas kutime faras sian vergaron el betulbranĉetoj por minaci la malbonkonduktulojn la 5-an de decembro. En la senfinaj betularbaroj de la malproksima nordo eĉ nun vivas popoloj, por kiuj ĉi tiu arbo provizas preskaŭ ĉion necesan por la ĉiutaga vivo. Trabojn por domoj kaj tegmentoj, brullignon, kiu ne bezonas esti seka por bone bruli, dolĉan sukcon, el kiu oni faras vinon kaj siropon, sed ankaŭ gluon, aŭ oleon kontraŭ kuloj. La ŝelo estas uzata por fabriki kanuojn, tornistrojn, akvuojn, ŝuojn, vestojn kaj paperon, kaj por ekbruligi la fajron. El la branĉoj kaj folioj oni pretigas balailojn, farbon kaj sapon. Neniu miru, ke la betulo iĝis la nacia arbo de Rusio.


[www.josvertelt.nl](http://www.josvertelt.nl)


Ook in andere talen →



Also in other languages →



Ankaŭ en aliaj lingvoj →

